ĈEA-retkomunikoj 1/2007

CxEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Cxehxa Esperanto-Asocio sendata al cxiuj rete atingeblaj membroj de CxEA sed ankaux al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Cxehxio. Gxi neniam enhavas aldonajxojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ilin, suficxas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO:


1. EUxROPA ESPERANTO-UNIO
2. LA POLA RADIO PLU AUxSKULTEBLA
3. PASPORTA SERVO 2007 MENDEBLAS
4. CxEHxA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS (OFICIALA ORGANO DE CxEJ)
5. KALENDARO de E-ARANGxOJ EN CxEHxIO kaj STARTANTAJ EL CxEHxIO


## 1. EUxROPA ESPERANTO-UNIO

La Euxropa Esperanto-Unio (EEU) estas asocio por antauxenigi Esperanton en la Euxropa Unio kun la strebo igi la Euxropan Union lingve efika kaj sendiskriminacia. Gxi fondigxis jam en la jaro 1997 dum la UK en Rejkjaviko, sed gxi devis esti plurfoje revivigita. Nun gxi jam kelkajn jarojn laboras tre vigle, ekde la jaro 2005 gxi estas jure registrita en Belgio, kie gxi kreis en Bruselo Komunikadcentron, kiu i.a. celas informi Euxroparlamentanojn pri Esperanto. CxEA estis plurajn jarojn "neoficiala membro" (do ni estis informitaj kaj iom partoprenadis la diskutojn, kvankam ni ne pagis membrokotizon). Ekde la UK en Vilno 2005 CxEA jam estas plenrajta membro de EEU. En Vilno ankaux estis elektita nova estraro de EEU: Sean O Rian (prezidanto), Flory Witdoeckt (VP), Zlatko Tišljar (sekretario), Georgo Handzlik kaj Peter Baláž.
Oficiala TTTejo de EEU estas http://www.europo.eu/, sed gxi prizorgas ankaux la TTTejon www.lingvo.org. EEU ankaux eldonas Euxropan Bultenon, kiun oni povas legi cxe http://www.europo.eu/index.php?art=4 kaj cxiun duan jaron arangxas la Euxropan Kongreson. La plej proksima, jam la 7-a, okazos en Maribor, Slovenio, ekde la 28-a de julio gxis la 4-a de auxgusto 2007, rig. http://esperanto-maribor.si/.

## 2. LA POLA RADIO PLU AUxSKULTEBLA

Malgraux la januara cxesigo de la esperanto-elsendoj de Radio Polonia pere de mallongaj ondoj, oni dauxre povas auxskulti gxin pere de interreto. Nova juna redakcia teamo nun pretigas cxiutage dudekminutan elsendon, kiun oni povas auxskulti cxe http://www.polskieradio.pl/eo/ - en la kadro Auxskultu oni povas tuj lancxi la lastan elsendon; sub gxi trovigxas Arkivo de antauxaj elsendoj. La nova sistemo ebligas precizan kalkuladon de auxskultantoj, tial nun des pli gravas subteni la elsendojn per auxskultado.

## 3. PASPORTA SERVO 2007 MENDEBLAS

Pasporta Servo plifaciligas internacian vojagxadon kaj trovadon de interkulturaj kontaktoj, ebligante al siaj membroj resti en la hejmoj de aliaj esperantistoj. Cxiujare oni kompilas liston de gastigantoj kiuj pretas senpage akcepti gastojn por tranoktado. La nun aperanta eldono por 2007 enhavas 1294 adresojn en 89 landoj. Necesas scipovi Esperanton

por uzi la servon.
Cxehxa Esperanto-Junularo organizas grupan mendon de PS 2007. Unu ekzemplero kostos cx. 450 Kč. Tamen por certigi gxin necesas mendi rapide, ene de kelkaj tagoj. Interesigxantoj skribu al cxej@blahus.cz

4. CxEHxA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS
(OFICIALA ORGANO DE CxEJ redaktita de Marek Blahuš)

Cxehxa Esperanto-Junularo (CxEJ) festas 2 jarojn ekde la momento, kiam tri studentoj unue kunvenis por restarigi la organizitan junularan e-movadon en Cxehxio. La civitana asocio nun havas 71 membrojn kaj gxia plej granda gxisnuna atingo estas la internacia trejnseminario okazinta en Brno, pri kiu oni nun povas legi resumon en la retpagxaro de CxEJ.

Jarsxangxe 5 CxEJ-anoj cxeestis renkontigxon Ago-Semajno en Pollando. En la skipo estis pluraj novuloj kaj iliajn entuziasmajn raportojn vi povas legi en la retpagxaro. Samloke spekteblas ankaux nemalhavinda filmo pri la arangxo. Aldone, la 6-an de januaro Marek BLAHUŠ reprezentis Cxehxion dum esperantista supreniro sur la monton Poludnica en slovakiaj Tatroj.

Post sukcesa disvendo de 100 ekzempleroj de la DVD "Esperanto Elektronike" dum 4 monatoj, CxEJ nun disponas per novaj 100 ekzempleroj de la dua, plibonigita eldono, kaj ofertas gxin al acxetemuloj. En Pasporta Servo 2007, mendebla per CxEJ, aperis du novaj junaj gastigantoj (Dagmar CHVÁTALOVÁ kaj Petr DOHNÁLEK). Jan URBÁNEK kaj Marek BLAHUŠ instruos dum la lasta februara semajnfino en seminario de SKEJ pri Vikipedio en Partizánske, Slovakio. Aktualajxoj pri cxehxa junularo cxiam troveblas en gxia retpagxaro cxe http://www.esperanto.cz/cej

5. KALENDARO de E-ARANGxOJ EN CxEHxIO kaj STARTANTAJ EL CxEHxIO

2007-03-19/31: Esperanto-ekspozicio en la urba biblioteko (iama urbodomo) en Litomyšl. En gxia kadro okazos "Prelego pri Esperanto kun sekva diskuto" marde 2007-03-20 je 17:00.
Inf.: flidr.josef@lit.cz

2007-04-13/15: Adonido (Hlaváček jarní) en Ratíškovice. Renkontigxo de amantoj de naturo kaj bongusta vino. Inf.: melicharkova@quick.cz

2007-04-13/15: Laborseminario en Písek dedicxita al a) kreado de retpagxoj de E-kluboj, b) tradukado de jam ekzistantaj retpagxoj de urboj kaj aliaj memorindajxoj en Esperanton kaj strategio de ilia enretigo. Bonvenas kaj spertuloj pri komputiloj kaj E-tradukado, kaj cxiuj seriozaj laikoj!

2007-04-14: Sabla Printempo en Písek, turisma, kultura kaj kleriga programo, paralele kun supre menciita laborseminario. Inf. por ambaux eventoj: pavladvorakova@tiscali.cz

2007-04-16/22: Printempa seminario en Skokovy, Cxehxa Paradizo. Inf.: drahotovaesperanto@seznam.cz

2007-05-04/06 (kun ev. plilongigo gxis 08): Maja renkontigxo de Katolika sekcio de CxEA en komforte ekipita pilgrimdomo en Dub nad Moravou. Inf.: m.svacek@seznam.cz

2007-05-26: Renkontigxo de ekstendaranoj de iamaj tendaroj en Herbortice. Inf.: m.svacek@seznam.cz

2007-05-30/06-03: La 5-a kongreso de AEH-IKEH (Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj), en moderna senbariera konstruajxo Juniorcentro, Seč (30km sude de Pardubice), kun la kongresa temo "NE ESTU SOLA!". Inf.: aeh-ikeh@volny.cz

2007-06-09: Infana Esperanto-Tago en Svitvy, ekskurso al la Afrikaj trofeoj kun konkurso (kune kun la polaj infanoj), inf.: dvorakovalibuse@quick.cz

2007-06-14/17: La 6-a Turisma Renkontigxo en Plasy proksime de Plzeň (TREP). Inf.: esperantoplzen@centrum.cz

2007-06-16: Somera Esperanto-balo en Česká Třebová. Inf.: zn.esperanto@seznam.cz

2007-06-17: Cxehxa-pola-slovaka Esperanto-renkontigxo sur la pinto de la lim-monto Cxantoria. Inf.: suchanekj@seznam.cz

2007-06/30/07-06: EKOTUR 2007, Jam tradicia ekoturisma renkontigxo por piedirantoj kaj biciklantoj. Cxi-jare en Radošov apud Karlovy Vary, parte turismado en la montaro "Krušné hory", kun unutaga vizito de Internacia Filmfestivalo Karlovy Vary. Info: http://www.kava-pech.cz/ekotur aux chrdle@kava-pech.cz

55-a SET Lančov (Somera Esperanto-Tendaro): la cxijaraj etapoj okazos en la datoj kun instruo de jenaj lingvoj:
2007-07-01/14 - La 1-a etapo (Esperanto, angla, germana)
2007-07-15/28 - La 2-a etapo (Esperanto, angla, germana, hispana, rusa)
2007-07-29/08-11 - La 3-a etapo (Esperanto, angla, germana)
En la dua semajno de la tria etapo okazos seminario pri laboro por Esperanto en la nuntempaj kondicxoj kaj fine de la tria etapo la ekstendaranoj kaj amikoj de la tendaro festos la 55-an jubilean tendaron.
Gxustatempa aligxo donas rabatojn. Pli da informoj kaj aligxiloj cxe http://www.set-lancov.cz/ aux cxe podhradska@volny.cz

2007-07-21/28: Atentu: la komuna busvojagxo el Olomouc al la 18-a Ekumena Kongreso
(60-a IKUE, 57-a KELI) kune kun la 8-a Junulara Ekumena Esperanto-Tendaro. Pelplin (PL), pri kiu ni informis pasintnumere NE OKAZOS pro malgranda nombro de aligxintoj. Oni veturos komune, sed trajne. Inf.: m.svacek@seznam.cz

2007-07-28/08-13: 17-taga flugkaravano al Japanio kun partopreno de la 92-a Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo, por interesatoj post la kongreso supreniro al la pinto de la monto Fujxi.
Inf.: http://www.kava-pech.cz/uk-jokohamo (en Esperanto) aux

http://www.kava-pech.cz/uk-jokohama (cxehxe), aux
chrdle@kava-pech.cz

2007-09-12/16: La 16-a konferenco de IKEK (Internacia Komunista Esperanto-Kolektivo) en Dobřichovice apud Prago. Inf.: dieter.rooke@tiscali.ch

2007-09-21/23: Konferenco de Cxehxa EsperantoAsocio en Svitavy. Inf.: podhradska@volny.cz

2007-09-24/30: InPaSem 2007 (Internacia Paroliga Semajno), kurso por komencintoj kaj seminario por jamaj parolantoj en Dobřichovice apud Prago. Inf.: http://www.kava-pech.cz/inpasem aux chrdle@kava-pech.cz

Kaj jam notu por la jaro 2008:
2008-11-07/09: KAEST 2008 (Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) en Dobřichovice. Inf.: chrdle@kava-pech.cz

En la kalendaro estas envicigitaj nur la eventoj, kiuj okazos en Cxehxio aux almenaux startas el Cxehxio. La eventojn en eksterlando vi trovos cxe http://www.eventoj.hu/kalendar.htm